

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 507

JANUARO 1948

NONI KAJ MANI

De JÓN SVENSSON

Esperanto-traduko de Paul van den Hövel

La verko rakontas pri la spertoj de du malgrandaj Islandaj knaboj, kiuj veturas per remboato kaj perdiĝas ie sur la vasta maro. Ĝi estas kredeble destinita por junuloj ; povas esti, ke en sia Esperanto-traduko NONI KAJ MANI taŭgas ankaŭ kiel facila legaĵo por plenaĝaj lernantoj finintaj elementan kurson.

Bele presita sur bonega papero. 160 paĝoj. Ilustrita.

Broŝurita 2ŝ. 6p., afranko 33. (11 rpk.)

Bindita 3ŝ. 6p., afranko 3p. (15 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ni bedaŭras ke ni ne povas akcepti mendojn el landoj de kie oni ne povas sendi pagon
(aŭ rpk.) al ni.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Kio estas Pensologio ? Broŝureto sendota senpage, kun folio LA VIVO TRANSFORMITA, laŭpete al (E) Hipsley, 17 Abbots Road, Birmingham 14, Angllando. POVO SUKCESI kontraŭ 3 i.r.k. "Traktaĵo rekomendinda kaj pripensinda, kun instruo tre bezonata en la nuna tempo !" (British Esperantist). Hipsley, kiel supre.

Argentino, Buenos Aires (8), Amalia 347 (Liniers), S-ro Giordano Bruno, López, p.m. k.ĉ.l., kvanto kaj valoro reciprokaj. Certe respondos.

Ano de Laborista Partio deziras korespondi kun unu serioza Esperantisto en ĉiu lando pri la regado en la lando kaj kiom ĝi rilatas al la demokrata socialismo. S-ino Hilda de Vere, Bela Monto, Wrotham, Kent, Anglujo.

Don Kihoto de la Manĉo, literatura ĉefverko hispana, en ĉiuspecaj eldonoj fremdlingvaj, ankaŭ en ĝisnunaj esperantaj fragmentoj, aĉete dezirata. Ankaŭ esperanta hispana literaturo ĝenerale kaj speciale. Ĉe hispanoj oni pereblus la UEA-membro-kotizon. Ofertoj kaj havigkondiĉoj al UEA-Peranto, D-ro R. Zaballos Morales, Fray Marcos (Florida), Urugvajo.

Ernesto Schlesinger, Cluj, str. Regina Maria 22, Rumanujo, serĉas seriozajn filatelistojn kaj korespondantojn el okcidentaj landoj.

Mi deziras korespondi pri literaturaj temoj kaj interŝanĝi literaturaĵojn de Esperantaj, Anglaj, kaj Francaj lingvoj kun gesamideanoj el tuta mondo. Respondo garantiata, sed ne respondos pri aliaj temoj. Skribu al Cecil S. Lee, Editorial Staff, Ta-Kung-Pao, Tientsin, Ĉinujo.

Mi interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Tuj kaj ĉiam respondos. S-ro Robert Marinier, 2 Rue de l'Ancienne Mairie, Boulogne (Seine), Francujo.

Kontraŭ 25-50 aŭ 100 diversaj poŝtmarkoj mi sendos ĉiajn ilustritajn Parizajn revuojn. Respondo garantiata. S-ro Deck, 27 Rue Danton, Issy-les-Moulineaux (Seine), Francujo.

Dek personoj el eksterlando, kiuj vojaĝas kune sur la franca fervojaro rajtas rabaton. Petu informojn de Bureau-Renseignements, Gare St. Lazare, Paris, Francujo. (Esperanto uzata).

S-ro Daniel Carion, 12 rue Racine, La Courneuve (Seine), Francujo, deziras por siaj lingvaj laboroj ricevi gramatikojn de ne tre konataj lingvoj (Azio, Ameriko, Glaciaj regionoj). Li sendos interŝanĝe librojn aŭ revuojn.

Pola studento deziras korespondadi angle, germane, ruse, kaj esperante kun samideanoj kaj samideaninoj de tuta mondo. Mi interesiĝas pri poŝtmark-kolekto, fotoj, skoltmovado. Mi interŝanĝos 50 polajn div. poŝtmarkojn por 50 aliaj. Afranku filatele. J. Balcerzak, Narutowicza 13, Pabianice, Pollando.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. James Vale, 26 Stiles Road, Clontarf, Dublin, Irlando.

Deziras interŝanĝi poŝtkartojn k.ĉ.l. Arne Nielsen, Wesselsgade 14 C/I, København, Danujo.

Mi deziras ricevi diverslandajn poŝtmarkojn. Interŝanĝe mi sendos Esperantistajn gazetojn. S-ro Romain Chambaz, 44 Rue du Haut-Pavé, Etampes (S. et O.), Francujo.

Tutmonde korespondi kaj interŝanĝi filatele afrankitajn leterojn, il. poŝtkartojn, aŭ poŝtmarkojn deziras S-ro Fr. Cunderla, teknika oficisto, Hrnčirská 10, Zlin, Ĉeĥoslovakujo.

Brita oficiro serĉas postenon en Japanujo. Parolas hindustanan, germanan, kaj francan lingvojn. Korespondas hispane, itale. Stenografias angle. Lieŭt. A. J. Cameron, National Bank of Scotland, Inverness, Skotlando.

Kongresoj, Ruĝa Kruco, poŝtstampojn serĉas Anderegg-Chevalley, Horn/Bodensee, Svislando.

Anglaj liceaninoj deksejaraj deziras korespondi kun junulinoj ĉiulandaj. Sendu al F-ino Jay, Girls' Grammar School, Bishop Auckland, Co. Durham, Anglujo.

Poŝtmarkoj : 50/100 kontraŭ egalkvanto interŝanĝos Vincento Bourke, 48 Fitzroy Avenue, Dublin, Irlando. Respondo certe garantiata.

Letervesperon aranĝas 26-1-1948 loka TJO-grupo Karlovy Vary, Belehradská 3, Ĉeĥoslovakujo. Respondo garantiata.

Letervesperon organizas la 17an de Februaro kaj ekspozicion projektas fervojista rondo en Parizo. Sendu leterojn kaj materialon al Retault, 84 rue de Paris, Clichy (Seine), Francujo. Respondo garantiata.

Apikulturo. Abelbredisto deziras korespondi kun samfakuloj aŭ fakrevuoj en nenajbaraj landoj. Paul Hofer, Gaessli, Haegendorf, Svisujo.

Mi urĝe bezonas bildetojn disdonitajn je entombigo (historiaj klarigoj?) rekompenco. Afranku filatele. Mi serĉas korespondant(in)on aŭ pm. pk. kolektanton el turista regiono. Internacia Turisma Esperanto-Centro, Konijnenperken 107, Boschvoorde-Brussel, Belgujo.

Poŝtkartvespero. Vi certe ricevos respondon se vi el ĉiuj partoj de la mondo sendos pk. il. al nia vespero la 11an de Jan. 1948. Motala Esp.-Klubo, S-ro Carl Hallros, Agneshögsgatan 11, Motala, Svedujo.

Jean Marshall, Kongresanino 121, deziras informon pri sia valizo, lasita en Berno. Bonvole skribu al Hetherdale, Stirling Road, Dumbarton, Skotlando.

Filatelistoj ! 38-jara edza policisto, deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. kaj il. pk. kun ĉiuj landoj. Certe respondos. Pavel Dobiáš, Zámecká 62, Frydek 1, Ĉeĥoslovakujo.

Helpu propagandi nian movadon ! Por niaj letervesperoj je la 15a de ĉiu monato ni petas alsendu bonvole leterojn aŭ poŝtkartojn ilustritajn. Danke ni ricevus salutojn de la tuta mondo (eble ĉiu temo estas agrabla). Ni certe respondos. Esperanto-cirklo Hannover-Suedstadt. Skribu al D-ro Ed. Heidemann, Bischofsholer-Damm 52, Hannover, Brita Zono, Germanujo.

Koresponda oficejo, Danlando. Se vi deziras korespondi kun Danaj Esperantistoj skribu al Anna Thomsen, Aegirsvej 6, Fredericia.

Poŝtmark-interŝanĝo. Serioze mi interŝanĝas nedifektitajn pm. Sendu kvanton kaj vi ricevos la saman. F. Nálevka, Direkcio PTT, Pardubice, Ĉeĥoslovakujo.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Januaro 1948
N-ro 507 (I)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro :
MASON STUTTARD

Cion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Cion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅓ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkuponon por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

NOVJARA SALUTO DE LA PREZIDANTO DE U.E.A.

KARAJ GESAMIDEANOJ !

Kiam mi nun por la unua fojo kiel prezidanto turnas min pere de nia gazeto al vi ĉiuj, membroj de nia novorganizita U.E.A., mi deziras unue danki vin pro la konfido, kiun vi montris al mi per tiu elekto.

Favorata de la fakto, ke ni nun havas unuecan neŭtralan Esperanto-movadon, nia asocio aliflanke vidas siajn agadkampojn ĉirkaŭbaritaj de politikaj kaj ekonomiaj malhelpaĵoj.

Kiam ni rerigardas la okazintaĵojn de la pasinta jaro, ni tamen ĝenerale povas esti kontentaj. Ni ja, malgraŭ rigoraj valutodecidoj en la plimulto de landoj, povis multnombre kolektiĝi en Bern por festi la 32-an universalan Esperanto-kongreson. Kiam okazis la unua Esperanto-kongreso en Hago post la unua mondmilito, ĉeestis nur 400 personoj. En la Berna kongreso, la unua post la dua mondmilito, kolektiĝis preskaŭ 1.400 !

El tio evidentiĝas, ke la movado du jarojn post la dua mondmilito estas multe pli forta ol post la unua milito. Tio estas des pli miriga, ĉar dum la unua milito la diversaj militantaj ŝtatoj, ankaŭ la germana, oficiale uzis Esperanton por fari reklamon por siaj vidpunktoj. Dum la dua milito Esperanto estis malpermesata de la hitlera reĝimo en multaj landoj, la Esperantistoj persekutataj kaj eĉ mortigataj.

Dum la milito mi havis kontakton—parte kaŝan—kun Esperantistoj en multaj nazi-subpremitaj landoj, ekz. en Ĉeĥoslovakujo, Polujo, Aŭstrujo, Germanujo, Nederlando, Francujo k.t.p. Mi spertis, ke ĉie la esperantistoj, kvankam suferantaj pro la premo de la reĝimo, sentis sin alkroĉitaj al la ideo de esperantismo kiel savilo en la plej teruraj travivaĵoj. La ricevitaj kortuŝaj leteroj formas imponan pruvon pri tio, ke la Esperanto-movado ne povas esti mortigata per subpremo. Interesa fakto estas cetere, ke dum la milito alvenis al la neŭtrala Svedlando eĉ germanaj rifuĝantoj, kiuj estis lernintaj nian lingvon dum la hitlera epoko !

Tiel estis dum la milito. Ĉu ni do nun, kiam la milito finiĝis, ne povas optimisme rigardi la estontecon, eĉ se la vivkondicoj en la mondo estas ĥaosaj ! Dum la tuta milito aperis niaj jarlibroj, aperis nia revuo. Kaj post la milito nia movado reprenis sian pozicion en tia grado, ke objektiva observanto devas miri. Rigardu la kreskon de la Brita Esperanto-Asocio, aŭdu la ĉiutagajn disaŭdigojn de la Esperanto-programoj en la ĉeĥa radio, atentu la oficialan rekonon de Esperanto en Hungarujo kaj Aŭstrujo ! Jen kelkaj ekzemploj inter multaj.

Kreiĝis denove internaciaj profesiaj Esperanto-organizaĵoj, ekz. por la instruistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj k.t.p. Disvastiĝis la delegita reto de U.E.A. tiomgrade, ke ĝi jam superas la antaŭmilitan staton, se ni forprenas la germanan teritorion.

Ĉu ni do ne havas kaŭzon kun plena fido rigardi la estontecon !

U.E.A. estas nun la sola neŭtrala, netendenca internacia organizaĵo de ĉiuj Esperantistoj. Kaj U.E.A. estas preta aktive akceli nian movadon. Ĝi volas ne nur registri la atingitajn rezultojn de la laboro de la landaj asocioj kaj de izole laborantaj esperantistoj. U.E.A. ankaŭ volas fariĝi la gvida centro, subtenata de ĉiuj ideriĉaj kaj laborkapablaj gesamideanoj, rilate al la internacia propagando kaj la utiligo de la lingvo por praktikaj celoj. La delegita servo estas konsiderinda parto de tiu celado. U.E.A. ankaŭ forte subtenas la starigon de diversprofesiaj fakaj entreprenoj, pere de kiuj Esperanto povos unuavice akiri la respekton de la ĝenerala publiko. Jes, ĉiu interŝtata servo, kiun povas plenumi U.E.A. estas nova fortika murŝtono, kiun ni povos uzi en la konstruado de la granda Esperanto-domo, kies enloĝantoj iam estos la tuta homaro.

Grava estas la rolo de U.E.A. Kaj grave estas subteni ĝin, ĉar tiel oni subtenas la progreson de Esperanto.

Eble kelkaj el vi faros rimarkon, ke U.E.A. ankoraŭ havas mankojn en sia organizaĵo : ke la statuto povas esti plibonigita, ke tiu aŭ alia fako ankoraŭ ne laboras perfekte. Certe vi pravas, ĉar ni ĉiuj spertas, ke preskaŭ ĉio en la mondo estas plibonigebla. Rigardu ekzemple la mondrekordojn en la sportaj konkursoj.

Mi opinias, ke la unua devo de ni ĉiuj estas eluzi nian U.E.A.-n, tia kia ĝi nun estas. Duavice ni penadu plibonigi la laborkondiĉojn por la disvastigado de nia lingvo. Mia speciala novjara saluto al vi je la komenco de la jaro 1948 estas : Sentu vin solidara al nia internacia organizaĵo ! Donu vian moralan kaj ekonomian subtenon al U.E.A. laŭ via kapablo ! Kaj helpu pligrandigi ĝian membraron kaj ĝian servokapablon !

Bedaŭrinde la tutmonda ekonomia krizo nebligas al gesamideanoj en multaj landoj doni monapogon al U.E.A., multaj eĉ ne povas pagi siajn kotizojn. Des pli grave estas, ke la gesamideanoj en tiuj landoj, kie la ekonomia situacio estas relative bona, provu multobligi la nombron de aktivaj membroj de U.E.A. La ĉefdelegitoj kaj la delegitoj en tiuj landoj portas grandan respondecon tiurilate.

Gesamideanoj ! Se ni laboras ĉiu laŭ sia kapablo, mi antaŭvidas kontentigan rezulton por la Esperanto-movado en la jaro 1948. Kaj en la espero, ke la nova jaro alportos al Esperanto—pere de sindona penado de ni ĉiuj—multajn venkojn kaj bonan reputacion inter la ĝenerala publiko, mi kore salutas al vi ĉiuj !

E. Malmgren.

LA PETSKRIBO

Ciferoj kontrolitaj ĝis 5-a de Decembro :

Landoj			
Nederlando ..	46844	Hungarujo ..	3589
Francujo ..	32216	Portugalujo ..	3462
Britujo ..	27634	Aŭstralio ..	3252
Ĉeĥoslovakujo ..	27424	Nov-Zelando ..	2540
Bulgarujo ..	21992	Svisujo ..	1882
Germanujo ..	20978	Egiptujo ..	1800
Svedujo ..	17759	Maroko ..	1037
Norvegujo ..	13750	Grekujo ..	810
Jugoslavujo ..	11740	Palestino ..	505
Danujo ..	9106	Irlando ..	463
Polujo ..	8106	Urugvajo ..	460
Aŭstrujo ..	7644	Kanado ..	359
Brazilo ..	6711	Hispanujo ..	276
Belgujo ..	6604	Hindujo ..	236
Finnujo ..	6353	Ceteraj lokoj ..	733
Usono ..	6268		
Argentino ..	6248		308690
Italujo ..	5844		
Islando ..	4065		
Okupoj			
Artistoj ..	1818	Navigaciistoj ..	1054
Delegitoj Komunumaj	481	Parlamentanoj ..	218
Dentistoj ..	515	Policistoj ..	2100
Desegnistoj ..	1989	Presistoj ..	3077
Dommastrinoj ..	42150	P.T.T.-istoj ..	6685
Edukaj Aŭtoritatuloj	1077	Religiistoj ..	1379
Elektristoj ..	2738	Sciencistoj ..	1093
Farmaciistoj ..	1156	Sindikataĉefoj ..	423
Farmistoj ..	9291	Soldatoj ..	3181
Hotelistoj ..	1571	Studentoj ..	29005
Inĝenieroj ..	12789	Ŝoforoj ..	2182
Instruistoj ..	17579	Ŝtatoficistoj ..	7162
Juristoj ..	1406	Teksistoj ..	1340
Ĵurnalistoj ..	1085	Transportistoj ..	13781
Komercistoj ..	53184	Urboficistoj ..	3395
Konstruistoj ..	5952	Vendistoj ..	8734
Kuracistoj ..	4061	Vestistoj ..	5677
Laboristoj ..	19746	Diversaj ..	18850
Lingvistoj ..	302		
Metiistoj Diversaj	20464		308690

Ni deziras atentigi niajn kunlaborantojn, ke la Petskriba kampanjo kredeble finiĝos en la printempo 1948, kaj ni petas ĉiujn fari unu lastan streĉon por pligrandigi la ciferon. Ni precipe admonas la samideanojn en tiuj landoj, kie la ciferoj estas malgrandaj, klopodi ke la nombro estu iom pli reprezenta.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

KAJ LA NUNTEMPA SITUACIO ĜENERALA

Jam estas banalaĵo atentigi pri la nuna krizo en internaciaj rilatoj politikaj, ekonomiaj kaj financaj. La ĉiutaga gazetaro ĝissate informas nin pri tio, kaj la plej sensencaj profetaĵoj rondiras. La nuntempa krizo estas varia sed ĝi ĉefe originas en la manko de konfido kaj la manko de cedemo. Unu kompletigas la alian.

Ĉiuj scias kaj lernas ĉiutage, ke la vivo iĝis pli komplikita kaj la plej proksima estonteco malpli antaŭvidebla. Oni scias, ke mankas ĉi tio aŭ tio, ke iam simplaj agoj fariĝis temporabaj procedoj. Kaj sub tio suferas la internacia agado, precipe tiu de celadoj humanecaj, kulturaj, sciencaj. Inter ili troviĝas ankaŭ nia malnova jam elprovita en tiaj situacioj, U.E.A. Kaj pri tio traktas la nuna artikolo.

La materia bazo de Universala Esperanto-Asocio

La materia bazo de U.E.A. estas la kotizoj. Dilemo: malalta kotizo, multe da membroj; alta kotizo, malmulte da membroj. El la unua sistemo rezultas nenia kontraŭservo, sed nur la fakto esti membro. La alia kontraŭe havigas al la membro videblajn servojn, Jarlibron, revuon, k.s. La nuna sistemo kunigas ambaŭ eblojn: la kolektivian anecon pere de la Landaj Asocioj, kaj kompletan membrecon per individua aliĝo. Ĉi tiu lasta certigis ĝis nun la financojn de la Asocio je 90%. Tio signifas, ke el cent ŝilingoj enspezitaj, 90 devenas de kotizoj de kompletaj membroj kaj 10 de kolektiva aŭ Asocia membraro.

El la faritaj spertoj ek de 1908, precipe el tiuj de 1920 ĝis 1945, rezultas tre grava konstato. Nur sub normalaj kondiĉoj la materia bazo de U.E.A. estas certigebla. Sed de 1914 jam ne ekzistas normalaj kondiĉoj en la mondo!

La elementoj de la materia ekzisto de ĉia internacia organizaĵo kun serva karaktero kiel U.E.A. estas:

(1) Politika stabileco en Eŭropo, la ĉefa kontinento por nia agado.

(2) Normalaj monkondiĉoj; kun tio estas intime ligata la ekzisto de proksimuma egaleco de salajroj en la ĉefaj landoj.

(3) Facila kaj simpla mon-transsendo de unu lando en alian; eblo uzi enspezojn en kiu ajn lando por la bezonoj de la Asocio.

Jen estas la kondiĉoj laŭ kiuj ĉiu privata organizaĵo internacia povas ekzisti sen financaj

komplikaĵoj. Se jam forestas unu el ĉi tiuj elementoj, okazas komplikaĵoj kun fina rezultato . . . defcito. Tio estas la konkludo el 40-jara sperto. La fakto, ke aliaj organizaĵoj kun agado simila al la nia, simile baraktas, estas konstato sed ne konsolo.

Universala Esperanto-Asocio post la unua tutmonda milito

La situacio en 1918–1919 neniel estis ĝojiga, sed ankaŭ ne malesperiga. La grandan esperon ĉiuj havis pri la firma deziro *ne plu milito* kaj pri la nova interŝtata ordo, la Ligo de Nacioj.

U.E.A. bezonis ses jarojn por retrovi ekvilibron de la financoj! En 1919 ni staris antaŭ la grava demando, ĉu akcepti membrojn kun favora kotizo, do malpli ol la oficiala kaj sekve riski perdon de kelkmiloj da frankoj ĉiujare, sed kun la spekulacio retrovi ĉi tiun perdon post la stabiligo de la ĉefaj monkurzoj kaj de la vivkondiĉoj; aŭ malakcepti aliĝon de membroj el ĉi tiuj landoj, se ne estos pagata la normala kotizo.

La demando en tiu tempo estis, kiom longe daŭros ĉi tiu transira stato. Tion neniu povis profeti en 1918–1919. Post ekzameno de la *por* kaj *kontraŭ* ni riskis la unuan. Tion faciligis la granda donaco de H. Hodler kaj la malavara subteno de pluraj samideanoj. Kunhelpis ankaŭ, ke ni povis eluzi iujn kondiĉojn por profite presigi en aliaj landoj kaj ekspedi niajn presaĵojn el landoj kun malalta valuto. La Asocio oferis belan sumon sed tio utilis. Se la ĉefa celo ne estis atingita, nome favora decido pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, tion ni ŝuldas al granda potenco tiutempe malprogreseme regata.

Dum la epoko 1919–1924 kristaliĝis ankaŭ alia konstato. Tio estis, ke ĉiu organizaĵo kun nekomerca karaktero, devas trovi flankajn enspezojn por certigi la regulan iron de la Asociaj aferoj. Ekzistis aro da movadoj kiuj aplikis tion. Necesis nur imiti kaj adapti tion al la karaktero de nia movado. La rezulto estis, la kreo de aro da mondonantaj servoj.

Universala Esperanto-Asocio post la dua tutmonda milito

Oni povus diri pri la situacio de 1918 kompare kun la nuna: "Ne ekzistas io malbona, kio ne povus esti ankoraŭ pli malbona."

Unue, ni devas kompreni, ke Eŭropo disfalis! De ĉi tiu konstato, ĉio cetera klariĝos per si mem. Ĉiuj helprimedoj kiuj ekzistas en 1919 ĝis 1925 por kompensi ion nenormalan, hodiaŭ jam ne ekzistas.

Due, ni devas kalkuli, ke Eŭropo bezonos dekon da jaroj ĝis regos proksimume normalaj kondiĉoj en la landoj kiuj plej interesas nin.

Trie, ni devas aranĝi nian laboron laŭ tio por atingi la savantan bordon en ne tro malbona stato.

Kelkaj komparoj kun 1919–1924 :

(a) Post la unua mondmilito la valuto de militintaj landoj havis unu kurzon por ĉiuj pagiloj, ĉekoj, bankbiletoj. Transpagoj en aliajn landojn estis eblaj sen speciala peto por la plimulto. Libera dispono pri mono enspezita en iu lando ankaŭ estis ebla. Do relative simpla situacio.

(b) La nuna situacio estas la jena : preskaŭ ĉiuj mon-valutoj havas du kurzojn, unu oficialan, fiksitan de la registaroj kaj aplikatan por aprobitaj transpagoj ; la duan por bankbiletoj. La oficiala kurzo plej ofte ne konformas al la realo kaj igas ke la prezoj en iuj landoj, kalkulataj laŭ ora mono, estas fantazie altaj por alilandanoj. Plie la transformo kaj transsendo de mono el unu lando en alian ne estas ebla, precipe el la plej gravaj landoj.

Rezultas el tio, ke nia Administra Centro en Britujo enspezas monon laŭ oficiala kurzo. Ĉi tiu mono troviĝas en aro da landoj precize plej gravaj. Ni citu : Aŭstrujo, Bulgarujo, Finnujo, Francujo, Hispanujo, Islando, Italujo, Jugoslavujo, Nederlando kaj Rumanujo, por citi nur dek. Germanujo estas aparta ĉapitro ; internacie la germana marko estas nekonata.

De la cititaj landoj la Administra Centro nur kun granda peno povas ricevi la monon. Sed ĝi devas pagi en Britujo por ĉio kion ĝi bezonas, kaj ĉio kion oni sendas al ĉi tiuj landoj finance baritaj. Enspezinte ĉi tiun monon en la cititaj landoj, la Administra Centro havas la grandegan plezuron klopodadi, ke oni permesu la transpagon al Britujo. Nur tiuj, kiuj konas ĉi tiun Kalvarion, ĉi tiun almozetadon ĉe la respektivaj oficejoj, scias, kigrade Eŭropo ruiniĝis.

Konkludo

Nia Administra Centro ne povas daŭrigi ĉi tiun kreditadon devigitan pro nebleco transformi en anglan mono enspezojn en multaj landoj. La risko perdi dekmilojn da ŝilingoj estas tuja. Aliflanke, oni devas pagi la presiston, poŝton, salajrojn kaj ceterajn kostojn de regula vasta administrado.

Ni emfazu, ke ne estas eble presigi nuntempe en alia lando por uzi enspezojn kaj eble profiti el diferenco de prezoj. Ĉiuj kombinaĵoj elpensitaj kaj aplikitaj en 1919 ĝis 1932 hodiaŭ ne estas eblaj, kaj ne estos dum longa tempo.

Kelkaj ciferoj

La 10 cititaj landoj formas preskaŭ la duonon de la membraro kaj de la enspezoj. Tio signifas, ke U.E.A. estus devigata krediti sumon de 25000 ĝis 30000 frankoj svisaj aŭ 1500 ĝis 1800 pundoj en jaro. Dum tri jaroj tio signifus laŭ oficiala kurzo sumon de 75000 ĝis 90000 sv. fr. aŭ 4000 ĝis 4500 pundoj en *blokitaj* monoj.

Ĉi tiu situacio ne tiomgrade ŝanĝiĝos, eĉ se unu aŭ du el la landoj povos fari transpagon ĉar estas preskaŭ certe, ke aliaj landoj aplikos simile rigorajn malpermesojn.

La enspezoj de la ceteraj landoj, Britujo, Svedujo, Svisujo kaj Usono, por citi nur kvar, neniel povos kompensi la mankon eĉ se la membro-nombro en ĉi tiuj landoj duobliĝus. Parenteze, ni atentu ĉi tiun fakton, ke sen la brita membraro la Asocio nur vegetus !

Ni staras hodiaŭ ĉe vojkruciĝo kaj meditas kiun vojon elekti. Ĉar similan situacion ni jam konis, ni diru tuj, ke internaj ŝanĝoj ĉu organizaj, ĉu administraj, neniel forigos la fakton, ke oni bezonas monon ! La malhelpoj venas de ekstere kaj ne estas mastreblaj de ni.

Funda pripenso kondukas al jenaj ideoj :

(1) La Komitato de U.E.A. dum kunvenoj en Bern, decidis ne plu akcepti kotizojn en landoj kie la Administra Centro ne povas ricevi la monon aŭ ne valorigi ĝin. La listo de tiuj landoj estas videbla en *Tabelo de la kotizoj por 1948*, kaj tre povas esti, ke ni devos aldoni aliajn.

(2) Estos akceptataj el tiuj landoj nur la kolektivaj aliĝoj (Asociaj membroj), do la baza membraro de U.E.A.

(3) Sistemo de *adoptado* pere de membroj en valutfortaj landoj, favore al la malfortvalutaj permesas ke kelkdekoj da personoj povos esti enskribataj kiel Membro-Abonantoj.

(4) Necesas, ke la nombro de kompletaj membroj (MA,MS) en bonaj landoj kresku. Sistema varbado estas do kondiĉo kaj la Estraro atendas de la Landaj Asocioj kiel ankaŭ de la Ĉefdelegitoj, ke ili faru ĉion laŭ sia povo por venki la krizon.

(5) Kaj la membroj en la nun ankoraŭ *bonaj* landoj (bonaj por nia agado kaj la monricevo, bone komprenu !) povas fari ankoraŭ ion pli— aliĝi kiel subtenanto por 1948 kaj fari donacon.

Atenta leganto vidas, ke la Estraro de U.E.A. ne atendas miraklojn. La sorto de nia internacia organizaĵo dependas de la kompreno pri influo kaj servoj de la Eŭropa malordo rilate ĉion, kaj de nia volo venki !

Konvinkite, ke danke al la bonvolo kaj oferemo nia Asocio trairos ĉi tiun jaron 1948, la Estraro de Universala Esperanto-Asocio fideme rigardas en la estontecon.

Hans Jakob, Estrarano.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Brazilo

Ekzpozicio de Esperantaĵoj

La *Hektoro* de la Brazilaj Esperantistoj, A. Caetano Coutinho, malfermis la Ekspozicion okaze de la XI-a Brazila Kongreso de Esperanto en S. Paulo. La fotografaĵo montras la tranĉon ĉe la silka rubando, kiu *fermis* la halon. Maldekstre de la pioniro oni vidas la prezidanton de la Kongreso, Prof. Francisca Rodrigues, kaj maldekstre de ŝi troviĝas la Ĝenerala Sekretario, Oswaldo Leite de Moraes.

Dek mil personoj skribis sian nomon en la libro por vizitantoj.



Britujo

Esperanto-semajno en Leeds

Unu el la plej entuziasmaj provoj por sciigi Anglojn pri Esperanto, okazis en Leeds Septembron 21-an ĝis 27-a. Centoj da leteroj estis senditaj al kluboj kaj grupoj en la urbo kaj la ĉirkaŭaĵo. Oni disvastigis sep mil flugfoliojn, montris 50 afiŝojn, informis 60 junularajn klubojn, kaj invitis 400 instruistojn al speciala kunveno. La B.B.C. menciis la Esperanto-semajnon en dissendo el la nordregiona stacio. Alvenis preskaŭ 400 leteroj kaj pakaĵoj el ĉiuj mondpartoj. La elspezoj de la kampanjo atingis 80 pundojn.

Dum la tuta semajno okazis Esperanto-ekspozicioj en la Centra Bibliotekejo kaj en la Muzeo. La propaganda valoro de la kampanjo estas netaksebla, sed unu tuja rezulto estis, ke la Komitato por Eduko starigis du kursojn en la vesperlernejo.

La rezulto de la konkurso pri la plej bone afrankita koverto estas: Unua premio—S-ro Wolfgang Kolderdorfer, Salzburg, Aŭstrujo; Dua

premio—S-ro Ladislav Piotrovsky, Ostrava, Ĉeĥoslovakujo; Tria premio—S-ro Otto Hertz, Kongens Lyngby, Danujo. La premioj jam estas senditaj.

Oni dankas ĉiujn, kiuj donis subtenon.

A. B. Clarke.

Germanujo

De la 18-a ĝis la 24-a de Majo 1948, tuj post la unua tutgermana kaj postmilita Esperanto-kongreso, je Pentekosto, okazos Internacia Junular-kunveno en la Alpoj. La Junularsekcio de Germana Esperanto-Asocio invitas ĉiujn junulojn partopreni en tiu, certe ne forgesebla okazaĵo. La partopreno kaj vojaĝo interne de Germanujo estos tute senkostaj por eksterlandanoj. Iliajn elspezojn portos G.E.A.

La aĝlimo por Germanaj partoprenantoj estas 25 jaroj. Perfekteco pri Esperanto-uzo kompreneble estos necesa.

Karaj amikoj! Venu viziti la plej belan regionon de tutgermanujo, la Bavarajn Alpojn. Oni tuj sin turnu al Germana Esperanto-Asocio, Postfach 47, MÜNCHEN, kun la indiko *Internacia Junular-kunveno*.

Pro Junular-sekcio de G.E.A.
H. Kliemann.

Hungarujo

Abony—Okaze de kultur-tagaj en Novembro, S-ro Horváth, D. de UEA, organizis ekspozicion kiu altiris la atenton de la vizitantoj. Kurso komenciĝas.

Budapest—Dum la Protestantaj Tagoj Tutlandaj, konferenco de la Hungaraj membroj de Kristana Esperanto-Ligo estis anoncita sur la ĝeneralaj afiŝoj de ĉi tiu manifestacio. Universitata Profesoro Nyireö paroladis pri historio de la mondlingvo kaj evoluo de Esperanto. Laŭ letero de la evangelia episkopo, la episkopa estraro rekomendas al la ekleziaj mezlernejoj akcepti Esperanton kiel nedevigan studobjekton. Similan rekomendon faris unu el la episkopoj de la reformita eklezio.

Je la 9a de Novembro okazis sukcesa vesper-festo aranĝita de la Hungarlanda Esperantista Societo Laborista en la parlamentejo.

Pesthidegkut—La politikaj partioj en ĉi tiu komunumo decidis kune helpi aranĝon de kurso. La loka socialista partio invitis nian Ĉefdelegiton Paŭlo Balkányi prelegi en tri lokaj partio-grupoj.

Italujo

Dum 7-9 Novembro okazis en Romo, ĉe la salono de la Franciskana Katedro, Katolika

Esperanta manifestado kun brila sukceso. Partoprenis pli ol 500 personoj.


La manifestado, organizita de samideano F. Ruggiero, komenciĝis per propagandaj prelegoj, faritaj de S-ro L. Minnaja, prof. V. Musella, kaj S-ro Blasimme.

La 9-an, dimanĉo, malfermiĝis per meso en la granda Baziliko de Sankta Antono, kiam Pastro Caroli predikis Esperantlingve. Okazis ankaŭ tre interesa literatura vespero.

Oni decidis inviti al Romo por la jaro 1948 la nacian kongreson de Katolikaj Esperantistoj, kaj por la jubilea jaro 1950 ties internacian. Multaj personoj enskribiĝis por kursoj.

Nederlando

Arnhem, la urbo de la Esperanto-Domo, estas konata al ĉiu samideano. Al la Esperanto-Domo kondukis aleo, nomita Esperanto-Laan, sed dum la milito ĝi malaperis. Danke al Esperantista Kunlabor-Komitato tabulo, pli bela kaj pli videbla estas inaŭgurita la 4an de Oktobro 1947. Ĉeestis la ceremonion multaj lokaj kaj invititaj samideanoj. Urba skabeno, S-ro H.M.A. Kompé, esprimis la dankon de la urbestro pro la starigo de la nomtabulo. Parolis post li S-ro G. F. Makkink pri la 60-jara jubileo de nia lingvo.



Esperanto inter ekzilitoj

Inter la senhejmuloj el ĉiuj landoj troviĝantaj en Germanujo estas ankaŭ multaj samideanoj. Malgraŭ la mizero, malgraŭ la malcerteco de la

estonteco, la Esperantistoj laboras. Jam ni sendis materialon, kaj ni ricevis informon pri okazigo de kongreso inter Litovaj Esperantistoj en loko Schwäbisch-Gmünd, 11-12 Oktobro 1947. Partoprenis ne malpli ol kvindek Litovaj samideanoj, kiuj decidis restarigi la organizaĵon Litova Esperanto-Asocio. Estas elektitaj delegitoj por la diversaj zonoj en Germanujo. Brita zono: Pranas Enskaitis; Usona zono: Adolfas Klimas; Franca zono: Pulgis Andrusevičius.

Sed la plej eksterordinara fakto estas apero de Litovlingva lernolibro, centpaĝa, eldonita je trimil ekzempleroj. Oni devas admiri ĉi tiun agadon de homoj sen patrolando kaj kun malcerta estonteco.

Aertrafiko

Grava Itala kompanio por aertrafiko estas favora al Esperanto. Temas pri kompanio AIRONE, kun sidejo en Cagliari, kunliganta per pluraj aerlinioj Sardujon kun tuta Eŭropo.

Ĉi tiu juna sed jam potenca organizaĵo komprenis ke Esperanto povas multe utili en la aertrafiko, kaj komencis uzi ĝin en la korespondado. Se ĝi rimarkos ke, pere de la internacia lingvo, estas petataj informoj, kaj ke la afero estas serioze prikonsiderata de la samideanaro, ĝi sentos sin kuraĝigita lernigi Esperanton al ĉiuj siaj oficistoj kaj precipe al tiuj destinitaj al la flugado.

Surduloj

La Brita Asocio de Surdetuloj kompilas tutmondan registron de organizaĵoj de tiuj, kiuj estas perdintaj aŭ perdantaj la aŭdkapablon, celante al internacia kunlaborado kaj korespondado. Por montri la utilon de Esperanto, bonvolu sendi sciigon kun detaloj de viaj lokaj kaj naciaj organizaĵoj por surduloj al: T. E. Cottam, 3 Riversdale Terrace, Sunderland, Anglujo.

Internacia Komerco-Unio

Por la praktika enkonduko de Esperanto en la komercon, industrion kaj bankojn, oni fondis Internacian Komerco-Union. La celo de I.K.U. estas plifaciligi la eksporton kaj importon de varoj inter unuopaj landoj kaj en sia komenco ĝi havas agentejojn en pli ol 30 landoj.

Gesamideanoj, mem. partoprenu, kaj informu entreprenojn, kiuj ne havas Esperanto-korespondantojn, ke ili povas uzi niajn servojn. Esperanto fariĝos mondlingvo nur tiam, kiam ĝi estos uzata en la komerco.

Petu informojn de S-ro Jaromír Pavlacký, agenteo de I.K.U. en Veselý nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo; S-ro M. M. Lourenço de Gouveia, agenteo, Rua das Dificuldades 28, FUNCHAL, Madejro; S-ro Nelson de Sousa, agenteo, Caixa postal 3677, RIO DE JANEIRO, Brazilo.

33-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Malmö, 1948



DUA INFORMILO

Ekskursoj : Plejparte posttagmezaj.

E 1	Rondveturo en Malmö	sv. kr.	3.50
E 2	Rondveturo per aŭtobuso al skaniaj kasteloj, norde de Malmö.	10.00
E 3	Rondveturo per aŭtobuso al skaniaj kasteloj sude de Malmö.	10.00
E 4	Tuttaga krozado en la markolo Öresund. Vizito en Hälsingborg. Merkrede.	15.00
E 5	Vizito al universitata urbo Lund. Lunde, marde, jaŭde kaj vendrede posttagmeze.	4.00
E 6	Banekurso al Falsterbo. Lunde kaj jaŭde ptm.	4.00

Krom tiuj ekskursoj LKK volonte aranĝos aliajn, se estos sufiĉe da intereso viziti specialan lokon. LKK atentigas vin pri tio, ke en Malmö estas bonaj banebloj en la sala maro.

Antaŭkongreso ne estos aranĝata.

Postkongresaj aranĝoj :

P 1	Vizito al Stockholm. La veturo tien-reen kostas	sv. kr.	59.00
	Krom tio oni devas antaŭpagi koston por loĝejo same kiel por la 33-a. Restado 3 tagoj.		
P 2	Rondveturo Malmö-Stockholm-Göteborg-Malmö	63.00
	Krom tio oni devas antaŭpagi koston por loĝejo kiel por la 33-a. La veturo daŭros 6 tagojn.		
P 3	Vizito al Laplando. Fervojbileto Malmö-Kiruna-Malmö	120.00
	Veturo de Malmö al Kiruna okupas 31 horojn. (Al Narvik en Norvegujo tien-reen kostas	130.00
	Veturo daŭras de Malmö ĝis Narvik 35 horojn).		
P 4	Veturo laŭ <i>Göta Kanal</i> , kanalo tra meza Svedujo inter Göteborg kaj Stockholm	29.50
P 5	Postkongreso en Kopenhago, ĉefurbo de Danujo 7 ĝis 10 Aŭg. Petu informojn ĉe postkongresa komitato, Gust. Kühlmann, Pr. Jörgensgade 4 A, Kopenhago, Danujo. Vojaĝbileto Malmö-Kopenhago	2.25
	La veturo daŭras 1 horon 45 minutojn.		

La programo por la postkongresaj veturoj ankoraŭ ne estas tute preta, kaj ne estas eble fiksi definitivajn prezojn

por P3 kaj P4 antaŭ Januaro 1948. Oni povas tamen nun anonci sin. La menciitaj prezoj estas la nunjaraj.

Somera Universitato : Ni provos aranĝi Someran Universitaton. Pliaj detaloj aperos poste.

La Kongresa programo : Ni provos aranĝi teatran kaj literaturan vesperojn. Preskaŭ ĉiutage okazos senkostaj filmprezentadoj kun filmoj pri Svedujo kaj aliaj temoj.

Skania Fairo : Sabate 31 de Jul. kaj dimanĉe 1 de Aŭg. oni havos okazon viziti la Skanian Firon.

Oficiala Kongresgazeto : Ĉiu kongresano ricevos la kongresnumerojn de *La Espero* (*Svenska Esperanto-Tidningen*), la organo de la Sveda Esperanto-Federacio.

Dua Listo de Kongresanoj

177. Tore Hallerström, Vingaker, Svedujo
178. Hilding Johansson, Eslöv, Svedujo
179. Karl Johansson, Billeberga, Svedujo
180. Rein Kapper, Kalmar, Svedujo
181. S-ino Marta Kapper, Kalmar, Svedujo
182. S-ino Vera Wahlberg, Stockholm, Svedujo
183. S-ino Hilma Cederholm, Malmö, Svedujo
184. L. L. Landin, Stockholm, Svedujo
185. S-ino H. Landin, Stockholm, Svedujo
186. A. Larsson, Malmö, Svedujo
187. N. Bergstrand, Malmö, Svedujo
188. S-ino E. Bergstrand, Malmö, Svedujo
189. E. Hansen, Holbaek, Danujo
190. S-ino J. Hansen, Holbaek, Danujo
191. F. Pytloun, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo
192. S-ino M. Pytlounova, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo
193. R.-S. Woźniak, Warszawa, Polujo
194. J. Dušek, Ustí n/L-Střekov, Ĉeĥoslovakujo
195. S-ino E. Dušek, Ustí n/L-Střekov, Ĉeĥoslovakujo
196. Š. Seemann, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo
197. S-ino P. Seemann, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo
198. F-ino Karla Jönsson, Ystad, Svedujo
199. S-ino E. Forsell, Malmö, Svedujo
200. F-ino Emy Ohlsson, Malmö, Svedujo
201. S-ino A. S. Setälä, Helsinki, Finnujo
202. M. František, Karlovy Vary, Ĉeĥoslovakujo
203. Hugo Pettersson, Stockholm, Svedujo
204. F-ino Elisabet Olsson, St. Essingen, Stockholm, Svedujo
205. Hans Abrahamsson, Norrköping, Svedujo
206. Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo
207. S-ino Harriet Carlén, Hällabrottet, Svedujo
208. F-ino Eva Carlén, Hällabrottet, Svedujo
209. Olle Carlén, Hällabrottet, Svedujo
210. E. B. Eklund, Fagersta, Svedujo
211. Henning Nilsson, Sandared, Svedujo
212. F-ino Margarethe Noll, København, Danujo
213. Andreas Bentsen, Herlev, Danujo
214. S-ino Y. Gangolf, Paris, Francujo
215. N. Wilquin, Paris, Francujo
216. F-ino O. Sörensen, Oslo, Norvegujo
217. Erik Holm, Malmö, Svedujo
218. F-ino L. Rydin, Malmö, Svedujo
219. S. Blikshavn, Haugesund, Norvegujo
220. H. Hauge, Haugesund, Norvegujo
221. B. Hetlevik, Haugesund, Norvegujo
222. Olav Thormodsen, Haugesund, Norvegujo
223. E. Vorland, Haugesund, Norvegujo
224. P. J. Hoope, Leiden, Nederlando
225. F-ino Inga Olofsson, Malmö, Svedujo
226. Oscar Persson, Göteborg, Svedujo
227. F-ino Märta Andersson, Malmö, Svedujo
228. S-ino Evy Olsson, Malmö, Svedujo
229. F-ino Odette Frégonara, Nice, Francujo
230. F-ino Clairette Frégonara, Nice, Francujo

231. L. Fischer, Oslo, Norvegujo
 232. A. Tilling, Västerås, Svedujo
 233. Sjo Allinger, Stockholm, Svedujo
 234. S-ino A. E. Allinger, Stockholm, Svedujo
 235. Arvid Persson, Vika, Svedujo
 236. Sven Dragsted, Kongens Lyngby, Danujo
 237. Sven Alexandersson, Hammarbyhöjden, Svedujo
 238. S-ino K. Alexandersson, Hammarbyhöjden, Svedujo
 239. R. H. Thomander, Borås, Svedujo
 240. Rezervita
 241. J. R. Grocott, Blackburn, Britujo
 242. S-ino N. Grocott, Blackburn, Britujo
 243. F-ino C. M. Glennie, Birmingham, Britujo
 244. F-ino M. Jay, Bishop Auckland, Britujo
 245. C. W. Gardner, Sheffield, Britujo
 246. S-ino M. I. Gardner, Sheffield, Britujo
 247. S-ino M. C. Major, London, Britujo
 248. E. L. Johnson, London, Britujo
 249. L. Márton, Budapest, Hungarujo
 250. S-ino L. M. Márton, Budapest, Hungarujo
 251. K. H. Friedmann, Santiago, Ĉilio
 252. S-ino E. Friedmann, Santiago, Ĉilio
 253. Axel Ahlqvist, Skanes Vårsjö, Svedujo
 254. S-ino Ruth Ahlqvist, Skanes Vårsjö, Svedujo
 255. Holger Johansson, Linköping, Svedujo
 256. Severin Nilsson, Linköping, Svedujo
 257. F-ino Dagmar Dahlberg, Örebro, Svedujo
 258. F-ino Ebba Dahlberg, Örebro, Svedujo
 259. F-ino Irma Janson, Lillán, Svedujo
 260. F-ino Linnéa Pettersson, Örebro, Svedujo
 261. Otto A. Nilsson, Malmö, Svedujo
 262. S-ino Elma Adamson, Göteborg, Svedujo
 263. F-ino Inga-Maj Adamson, Göteborg, Svedujo

Statistiko

Argentino 1, Aŭstralio 1, Belgujo 1, Brazilo 1, Britujo 19, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 13, Ĉilio 2, Danujo 15, Finnujo 2, Francujo 11, Hungarujo 4, Italujo 2, Jugoslavujo 2, Nederlando 6, Norvegujo 12, Polujo 1, Portugalujo 1, Svedujo 142, Svisujo 7, Usono 2. El 21 landoj 247. Rezervitaj 16. Sumo 263.

ENIGMA KONKURSO N-ro 23

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 21

N-ro 48: Neniu prudenta homo kontestos la utilecon de Esperanto. Slosilvortoj: narkotiko, endoskopo, novelisto, instalaĵo, ununūreco, peritoneo, rangifero, umbelacoj, difterito, emancipis, nekrologo, tarantelo, aviadisto, hermetika, oferemeco, majesteco, ortopedio, koncentra, observado, nostalgio, tarantulo, elektrono, saksofono, telegramo.

N-ro 49: Ni konstante ripetadis, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la internan vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei ligantan ponton inter la gentoj. La devizo de la ideaj esperantistoj neniam ĝis nun precize formulita, sed ĉiam klare sentata, estas: "Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si (reciproke) siajn gentajn apartaĵojn." Tia, laŭ mia opinio, estas la devizo

de la verda standardo, kiu kunvokas nin ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo en la nomo de la plej bela revo de la homaro.

Tria kongreso, 1907 en Cambridge
Originala Verkaro, p. 378/9

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 19-a konkurso: S-ro Ed. Decaneva (Ital.) 97p., S-ro S. Roelofsen (Ned.) 93.5p., S-ro C. Rogister (Belg.) 92p.

Enigmo N-ro 52: Ĉiam ŝanĝante nur unu literon samtempe, ŝanĝu: nenio en mondo, valso en polko, hundo en vulpo, gloro en honto, slavo en anglo, lanco en plumo, tablo en benko, kabanjo en palaco.

Po unu poento por ĉiu korekta ŝanĝo.

Enigmo N-ro 53: Dum familia kunveno ĉeestis: 1 avo, 1 avino, 3 filinoj, 2 geedzaj paroj, 2 patroj, 2 patrinoj, 1 bopatrino, 1 bopatro, 1 bofilo, 1 bofrato, 1 bofratino, 1 onklino, 1 nevino, 1 nepino, 2 fratinoj. Kiom da personoj minimume ĉeestis, kaj kiaj estis iliaj familiaj interrilatoj?

Enigmo N-ro 54: Kiom ofte vi povas legi ENIGMA KONKURSO? Legu ĉiufoje de maldekstre dekstren aŭ de supre malsupren. Du manieroj jam estas diferencaj se ĉe ili nur unu litero staras sur alia loko. Ekzemple:

ENIGMA	kaj	ENIGM
KONKURSO		AKONKURSO
E N I G M A K O N K U R S O E		
N I G M A K O N K U R S O E N		
I G M A K O N K U R S O E N I		
G M A K O N K U R S O E N I G		
M A K O N K U R S O E N I G M		
A K O N K U R S O E N I G M A		
K O N K U R S O E N I G M A K		
O N K U R S O E N I G M A K O		
N K U R S O E N I G M A K O N		
K U R S O E N I G M A K O N K		
U R S O E N I G M A K O N K U		
R S O E N I G M A K O N K U R		
S O E N I G M A K O N K U R S		
O E N I G M A K O N K U R S O		

Sveda pacgazeto Freden en ĉiu numero disponas unu kolonon de Esperanta teksto. Redaktoro de tiu rubriko estos s-no Einar Adamson. Gratulleterojn sendu al Red. de Freden, Jungfrugat 30.3 tr. Stockholm, Svedujo.

La redaktoro de The Young World (La Juna Mondo) petis informon pri Esperanto. Tiu redakcio eldonas junulrevuon en franca kaj germana lingvoj, krom la angla. Per via intereso (instigleteroj k.s.) oni eble decidus eldoni ankaŭ Esperantlingvan numeron de ĉi tiu treege interesa revuo por junuloj. Adreso: The Young World, 86 New Bond Street, LONDON, W.1, Anglujo.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



***Noni kaj Mani** de Jón Svenson. Esperanto-traduko de Paul van den Hövel. Eld. Josef Habel, Regensburg. 160 p. 18×12 cm. Broŝ. 2ŝ. 6p.

Tolbindita 3ŝ. 6p., aŭfranko 3p.

Jen la unua Esperanto-romano kiu aperis en Germanujo dum pluraj jaroj. Ĝin fizike karakterizas mirige bonkvalita papero kaj larĝaj margenoj; sur unu paĝo staras meznombro nur cent vortoj!

Ne estas eble konstati en kiu lingvo la originalo eldoniĝis (kio supozeble okazis fine de la deknaŭa jarcento) sed la Esperanto-traduko estas farita verŝajne el la germana lingvo.

La verko rakontas pri la spertoj de du malgrandaj islandaj knaboj, kiuj veturas per remboato kaj perdiĝas ie sur la vasta maro. Ĝi estas kredeble destinita por junuloj, kaj estas verkita kun moralinstrua tendenco kaj katolika fono. Povas esti, ke en sia Esperanto-traduko *Noni kaj Mani* taŭgus ankaŭ kiel facila legaĵo por plenaĝaj lernantoj finintaj elementan kurson.

La stilo estas simpla kaj preskaŭ ĉie facile komprenebla; la jenaj frazoj tamen estas miskomprenigaj: *daŭris ne longtempe, ke la pordo estis malfermata* (38) kaj *mi gardis min laŭte dirition* (61)—anstataŭe oni devus skribi: *post nelonga tempo oni malfermis la pordon kaj mi gardis min, ke mi tion ne laŭte diru*. Oni povus kritiki ankaŭ la trouzon kaj kelkafojan misuzon de la kunmetitaj verboformoj (precipe *estis -ata* kaj *estis -anta*) kaj la malatenton al la regulo pri la lokigo de adverboj tuj antaŭ la vorto, al kiu ili rilatas. Cetere estas troveblaj kelke da okazaj gramatikaj eraroj, sed nur du preseraroj estas rimarkitaj.

Entute oni devas gratuli la germanan eldoniston pro lia entreprenemo, kaj oni esperas, ke multaj aliaj sekvos lian ekzemplon, por ke la germanaj Esperantistoj povu repreni sian parton en la pliampleksigo de nia literaturo.

Alec Venture.

Sveda Laborista Movado: de Tage Lindbom. Trad. Martin Johansson: eld. Sveda Laborista Esperanto-Asocio: broŝ. 18.3×12.5 cm.: 92 p.: ilustrita sur artpapero: prezo 2 rpk. ĉe S.L.E.A., Barnhusgatan 8, Stockholm.

Iom neordinara verko en Esperanto estas ĉi tiu historia skizo pri la elvolviĝo de la laborista movado en Svedujo. Aparte menciinda estas la

fakto, ke la Estraro de la Unuiĝo de la Sindikataj Federacioj (LO) apogis la eldonon ne nur morale, sed ankaŭ finance.

Per prudenta elekto de elstaraj faktoj kaj diskreta prezento de la ĝenerala fono ekonomipolitika, la aŭtoro dokumentas la konverĝon de la radikalaj tendencoj kaj ties evoluon en fortan organizaĵon kun gravega soci-reforma karaktero.

La individua leganto reagos laŭ siaj principaj kredoj al la detala priskribo pri la inter si batalantaj tendencoj, la kompromisoj, kaj la rimedoj por atingi intiman kunligitecon de la politikaj kaj sindikataj movadoj. Oni devas tamen akcepti la fakton de ties fortega influo en la ĉiutaga vivo de la proletaro, kaj de la popolo ĝenerale. Oni povus diri, ke la sistemo ellaborita en Svedujo—laŭ la informoj en ĉi tiu libreto, kiu havas oficialan karakteron—prezentas sintezon de la argumento por la tiel nomita “okcidenta” demokratio, la sistema, iom-post-ioma klerigo de la amaso kaj la adaptigo de la regsistemo por konformi al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. En Svedujo tiu sistemo konstante plialtigis la nivelon de kulturo, de ekonomia vivo de la popolo, kaj garantiis al la laboristo gradon de ŝirmo, rilate liajn laborkondiĉojn, kiu estas nesuperita en la mondo.

Pri la sinteno de Svedujo dum la milito jam okazis multa polemiko, kaj estas certe, ke ĉi tiu dokumentaro aldonos novan *brulmaterialon* al la flamoj de disputo. Sur p. 30 la aŭtoro diras: *La registaro estis devigata al singarda politiko, kiu en certaj rilatoj entenis cedojn favore al la tiam fortega germana militpotenco*; kaj plue: *la socialdemokratio apogis la politikon de la registaro*. Iom poste, li daŭrigas per la jeno: *Oni unue atentis, ke la kritiko kontraŭ la registaro plifortiĝis nur en 1942. Se oni esceptas la pli malfacilan nutrosituacion, decidiga faktoro estis, ke la serio de klaraj germanaj malvenkoj komenciĝis* (p. 31) kaj: *La kritiko (kontraŭ la registaro) estis tre mallaŭta dum la jaroj 1940–41 kaj komencis laŭtiĝi nur kiam la milita potenco de Germanio malfortiĝis* (p. 31).

Supraĵe, tio povus indiki, ke la sveda popolo, inkluzive de la radikalaj fortoj, estis oportunisma en sia sinteno. La aŭtoro donas iom longan klarigon por defendi tiun agadon, kaj oni devas iri al la libro mem por esplori ĉiujn faktorojn.

La verko estas treege salutinda kaj bonvena, ne nur pro tio, ke ĝi konigas al ni la laboristan movadon mem, sed pro tio, ke eblas rigardi perspektive super multajn facetojn de la sveda vivo, fremdajn por eksterlandano.

La lingvo estas preskaŭ modela.

.M.S.

Esperantista Poŝkalendaro 1948: eld. Esp. Klubo en Hradec Kralové, Ĉeĥoslovakujo: tole bindita: 152 p.: 14×10 cm.: prezo 8 resp.kup.

Enhavo: Antaŭparolo, bildo de Zamenhof, himno, dataro, Deklaracio pri Esperantismo, poŝta tarifo (Ĉeĥoslovaka), paĝoj por adresoj k.s. Tre utila kaj salutinda eldonaĵo.

Saluton: eld. Esp.-Asocio en ĈSR., Uralské nám 9, Praha XIX, Ĉeĥoslovakujo: broŝ. 16-paĝa: 15×10.5 cm.: prezo 15 kĉs., eksterl. 3 rpk.

Beleta kaj ĉarme aranĝita informilo pri la allogaĵoj de Ĉeĥoslovakujo, kun kvinkolora bildeto sur ĉiu paĝo. Simpla kaj bonstila teksto.

Kiu Estas Kiu inter nordamerikaj Esperantistoj: dua eldono 1947-8: eld. "Espero," Route 5, LITTLE ROCK, Arkan., Usono: broŝ. 96 p.: 15×11 cm.: prezo unu Usona dolaro.

Interesa propagandilo kaj informilo pri la personoj en la Esperanto-movado de Nord-Ameriko.

Feuillets Encyclopédiques de Documentation Espérantiste: Fascicule No. 3. Francilingvaj informoj pri la Esperanto-movado laŭ ĉiuj aspektoj. Tre valora propagandilo por francilingvanoj.

Filmstrioj pri Javo, kun tekstkajeroj: eld. Esperanto Film-Grupo, Antwerpschestraat 45, Bergen op Zoom, Nederlando.

La nomita film-grupo havis la ideon produkti filmstriojn kun kajeroj kiuj havas klarigajn tekstojn en Esperanto, por ke grupoj povu pasigi interesajn kaj instruajn vesperojn. Dum montrado de la bildoj—ne movaj—iu samideano, ekzemple, povus legi la informojn. La Film-grupo estas ambicia, kaj entreprenas tre ampleksan serion, kiu verŝajne havos ĝeneralan intereson. Por ricevi detalojn pri prezoj kaj liverkondiĉoj, oni sin turnu al la ĉi-supra adreso.

21-a Kongreso de S.A.T. Por propagandi ĉi tiun kongreson, oni eldonis allogan kaj utilan Kalendaron 1948, kiu estas havebla kontraŭ respondkupono ĉe B. Bultemeyer, Jan van Galenstraat 86 I, Amsterdam W, Nederlando.

Bélyeggyűjtők, Budapeŝta revuo portas kovrilpaĝon kun teksto en Esperanto.

Universala Ligo, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando, anoncas la aperon en 1948 de *La Praktiko*. Oni povas mendi ĝin ĉe UEA (12 ŝil.)

Sokol en Ĉeĥoslovakujo

Se oni anoncas sin al Sokol-Kongreso, Národní 3, Praha I, Ĉeĥoslovakujo, oni ricevos senpage kaj regule ĉiujn Esperantlingvajn eldonaĵojn pri Sokol kaj la Ĉeĥoslovaka respubliko. Oni preparas pluajn interesajn kaj altvalorajn eldonaĵojn.

Bagatelo

Se malbeno
De ĉagreno
Senaverte
Trafas vin,
Ho, ne ĝemu,
Ne blasfemu,
Ĉar ja certe
Venos fin'.
Sed ne ridu
Kaj ne fidu
Al konstanta
Sorto-grac',
Ĉar ĝi pasos
Kaj vin lasos
Nur en vanta
Vivo-lac'!
Ĉar en stulta,
Senrezulta
Kaj tempesta
Viv' sen cel'—
Plor', mizero,
Ĝoj', espero . . .
Ĉio estas
Bagatel'!

Eug. Matwiejczuk, Polujo.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Buruncz—Al Lajos Buruncz, Delegito en Sárbogard, Hungarujo, kaj ties edzino, naskiĝis la 19-an de Novembro filo, nomita Lajos.

Støp-Bowitz—La 17an de Aŭgusto al Eva kaj C. Støp-Bowitz (prez. de N.E.L. kaj I.S.A.E.), filo, nomita Einar.

Edziĝoj

Gallefoss—Engeset—La 15an de Aŭgusto F-ino Liv Gallefoss edziniĝis al la sek. de la Esperantoklubo en Fredrikstad, Norvegujo, S-ro Per Engeset.

Rekve—Matland—La 19an de Julio la sek. de la Esperantoklubo en Bergen, Norvegujo, edziniĝis al la prez. de la klubo, S-ro Johan Matland.

Tangberg—Sandberg—La 8an de Novembro F-ino Karin Tangberg edziniĝis al S-ro Leif Sandberg, FD en Oslo, Norvegujo.

Niaj Mortintoj

Johns—Je la 28a de Oktobro forpasis F-ino R. H. Johns, Westcliff-on-Sea, Anglujo, Membro-Subtenanto de UEA kaj fervora subtenanto. Ni kondolencas.

Reisinger—Je la 2a de Decembro forpasis Joseph Reisinger, 76-jara, Genève, Svislando. Jam 50-jara li lernis Esperanton kaj atingis perfektecon tiagradan, ke li sciis verki formkorektajn poeziaĵojn, inter kiuj multaj aperis en ESPERANTO kaj aliaj gazetoj. Oferema kaj afabla li donis lastan centimon al rifuĝintoj. La Ĝeneva grupo konservas konoran memoron al tiu ĉi brava viro.

H.J.

Schmalzl—Kun granda malĝojo ni sciigis pri la morto je la 8-a de Novembro de Prof. Josef Schmalzl, Gauting bei München, Germanujo. Li estis dua Prezidanto de la Esperanto-Unio por la Usona Zono, kaj Estro de la Ekzamen-Komitato de GEĀ. Al liaj familianoj profundan kondolencan.

ARTEFARITA LINGVO LAŬ JOHANO AMOS COMENIUS

Unu el la plej distingaj viroj, kiuj okupiĝis pri la problemo de internacia lingvo estis Jan Amos Komensky (latine Comenius), pedagogo, filozofo, verkisto kiu vivis 1592–1670. Sed ĝis nun mankis dokumenta pruvo pri tio, kion Comenius skribis pri ĉi tiu problemo. En la Ĉeĥoslovaka gazeto *Esperantista* aperis artikolo de Josef Hendrich, kiun tradukis D-ro Kamaryt. Ni opinias ke valoras koni la ideojn de Comenius, ideojn kiuj multe proksimiĝas al tiuj de la moderna teorio pri internacia lingvo. (Redakcio).

Jam Comenius-antaŭulo Ludoviko Vives, naskiĝinta cent jarojn antaŭ li, vidigis deziron pri universala lingvo, kiu kunigus ĉiujn naciojn de la mondo; dum ĝi ne ekzistis, ni estis devigataj kontentiĝi per lingvo plej disvastigita, la latina.

Simile ekdeziris Comenius pri iu pli perfekta ligilo, pri internacia artefarita lingvo. Kiam li vivis en Anglujo, li vidis intuicie, kiel marnavigado kunigas jam eĉ la plej malproksimajn angulojn de la mondo; kaj ke jam la tuta mondo povus fariĝi preskaŭ unu domo, se ĉiuj nacioj posedus unu lingvon. Prenis do li en libron, verkatan en Anglujo, en la *Vojon de la lumo*, ankaŭ ĉapitron pri formo de universala lingvo. Tie li citis vortojn de Vives kaj esprimis deziron pri lingvo tute nova, kiu estus pli facila, pli agrabla, pli perfekta ol ĉiuj lingvoj ĝis nun konataj. Sed li restis nur ĉe difinoj la plej ĝeneralaj.

Denove li revenis al tiu ĉi ideo, kiam li verkadis sian *Universalan interkonsiliĝon pri plibonigo de homaj aferoj*. Unu el la libroj de tiu ĉi Universalan interkonsiliĝo estas *Panglotio, Ĉie-lingvo*. Ĝi estas libro, kiu estis rigardata kiel perdita (kiel kvin ceteraj partoj); sed antaŭ la milito trovis la mankantajn manuskriptojn prof. Cyževskij.* Ili ankoraŭ ne estas eldonitaj kaj ne estos baldaŭ alireblaj de pli vasta leganta rondo. Tial ni volas per malgranda specimeno doni imagon, kiel Comenius volis solvi problemon de la mondlingvo.

En *Panglotio* ja donas Comenius jam konkretajn specimenojn. Ne estas tie ellaborita sistemo de tuta lingvo: tute male. Comenius rekomendadis ne komenci pli frue ol estos ellaborita *pansofio* (kompletscienco). Tamen li vidigis per specimenoj, kiel li prezentas al si konstruon de la nova lingvo. Tiuj specimenoj estas de du specoj. Comenius plej ofte prenas kiel bazon vortojn latinajn kaj montras per ili, kiel artefarita lingvo simpliĝus kompare kun komplikeco kaj nereguleco

de samtempaj lingvoj; due, li prenas kiel specimennon vortojn novajn, kreatajn laŭ liaj principoj, kaj li montras per ili tre konkrete, kiel povus esti kreata nova internacia lingvo.

Interesa estas en *Panglotio* trarigardo de la ĝisnunaj lingvoj, kial ili ne taŭgas por lingvo universala. Ni metos tie ĉi specimene sole du alineojn (ĉap. VI, par. 10 kaj 11):

“Nek iu el la vivaj lingvoj, eĉ el tiuj plej kulturitaj, taŭgas; ĉar al neniu el ili mankus rekomendantoj kaj ĉiu nacio fierus pro sia Helena; tial ni ne progresus sen envio, malpacoj kaj konfuzoj. Kaj efektive ni havas neniun tute taŭgan. La itala, hispana, franca estas riveretoj el la lingvo latina, disvastigitaj ne per novaj fontoj, sed per novaj breĉoj. La francan rekomendas lerteco kaj agrableco; sed oni ne povas ĝin starigi kiel peranton de saĝeco, ĉar ĝi ne staras sur propraj radikoj, eliras el fremdaj. La angla estas rigardata ankoraŭ pli facila, sed ĝi taŭgas por ni ankoraŭ malpli—ĉar ĝi estas ankoraŭ pli granda kompilaĵo.

Kio pri lingvo slava? Tiu jam ŝajnas pli taŭga, ĉar: 1. kiel temojn ĝi havas sonojn ĝenerale naturajn, 2. en kunmetado kaj derivado de vortoj ĝi estas tre bona, 3. ĝi havas sonojn aŭ literojn ĉiuspecajn. Sed nek ĝi taŭgas por intencata celo universala, ĉar: 1. ĝi estas tro sibla pro siaj sonoj kaj amasiĝoj de konsonantoj, 2. dispartiĝas je multaj dialektoj, kiuj apenaŭ unu komprenas la alian—kiu el ili venkus? 3. Ĉiu ajn el tiuj dialektoj svarmas per senfinaj neregulaĵoj.”

Kiel oni vidas, Comenius rigardis la slavan kiel unu lingvon; se li aliloke parolas pri unuopaj slavaj lingvoj, li traktas la ĉeĥan kaj la polan kiel la saman lingvon.

Kiel specimennon de tiu grupo, kie Comenius demonstras siajn proponojn sur materialo latinlingva, ni prenu la verbon *esti*. La verboj havas diversajn formojn laŭ personoj kaj laŭ tempoj. Ĝi estas senutila. Kial lerni diversajn finaĵojn? Por indiki la personon sufiĉas simple la pronomoj. Ni prenu radikon de la verbo *esse*=*es*; tiam ni konjugacios simple tiel, ke ni antaŭ la radikon metos personan pronomon. Do estos indikativo de estanteco jena:

mi estas (sum)	eges	ni estas (sumus)	moses
ci estas (es)	tues	vi estas (estis)	voses
li estas (est)	illes	ili estas (sunt)	illies

Simile estas senutilaj finaĵoj por tempo estinta; sufiĉas antaŭmeti signon de estinteco *ante* (antaŭ). Estos do:

* Komparu: Dimitrij Cyževskij: Hall-manuskriptoj de verkoj de J. A. Comenius en Arĥivo por esplorado pri vivo kaj verkoj de J. A. Comenius, kajero 15, 1940. (Ĉeĥlingva teksto en originalo).

mi estis	anteges	ni estis	antnoses
ci estis	anttues	vi estis	antvoses
li estis	antilles	ili estis	antillies

√Tute simile oni faros futuron per signo de estonteco *post* (poste) :

mi estos	posteges	ni estos	postnoses
ci estos	posttues	vi estos	postvoses
li estos	postilles	ili estos	postillies

Verbradiko estos samtempe infinitivo de estanteco ; infinitivo estinteca kaj estonteca devenos el la du jam dicitaj prefiksoj *ante* kaj *post*.

Tute analogie oni povas simpligi deklinacion ; por kio estas la plej buntaj finaĵoj kazaj ? Sufiĉas koni deklinacion de la pronomo *quis*. Ĝiajn kazojn ni aligados al vortradikoj ; tiel estos deklinacio unusola, pronoma.

Ĉe adjektivoj ni havas ankaŭ senutilajn klopodojn pri deklinacio kaj diferencigo laŭ la sekso ; ni citu pri tio vortojn de Comenius (VIII, 6) : "Ĉe la adjektivoj estas en plejmultaj lingvoj diferencigo laŭ la tri seksoj malfacila, plej facila ĉe la germanoj, ĉiam per finaĵoj -er, -e, -es, ekzemple *ein guter Mann, eine gute Frau, ein gutes Kind*. Sed eĉ tiuj ĉi finaĵoj estas forlasataj, kiam antaŭiras difina artikolo *der, die, das*, ekzemple *der gute Mann, die gute Frau, das gute Kind*. Sed la hungaroj havas ankoraŭ pli mirindan avantaĝon. Ĉar la substantivoj ne havas la sekson, nek adjektivoj havas ĝin kaj kun unu kaj la sama finaĵo ili estas metataj ne sole al ĉiu nomo (kiel en la latina *felix vir, femina, animal*) sed ankaŭ al ĉiu kazo. Kvazaŭ vi dirus latine *bon vir, bon femina, bon animal, bon viro, bon virum, bon viro* k.t.p. Ĉar ĝi estas tre oportuna kaj forigas multajn malagrablajn, ĝi meritas imiton."

Ekzemploj el la dua grupo, kie la specimenoj ne estas prenitaj el latina materialo, sed estas elektitaj laŭ novaj principoj, mi prenos el memstara suplemento de *Panglotio* ; ĝi titolas *Provo pri nova harmonia lingvo*.

Tie ĉi la pronomoj ne estas prenitaj jam el la latina ; sufiĉas por ili tri sonoj ; do, mi=**o**, ci=**e**, li=**i**. Por pluralo novaj pronomoj ne estas bezonataj, kial ne procedi ĉe ili egale kiel ĉe la aliaj vortoj ? Ni aligos simple finaĵon de pluralo-**n**. Poste estos ni=**on**, vi=**en**, ili=**in**.

Deklinacio estos tre simpla. La kazoj estu kvin, nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo ; vokativo ne estas bezonata, ni voku per nominativo tre oportune kiel multaj lingvoj aliaj. (En la *panglotio* Comenius estis pli radikala, tie li volis, ke sufiĉu tri kazoj).

Finaĵoj de deklinacioj estos vokaloj **i, e, a, o**.

Estos do jena deklinacio :

O (mi)	o	oi	oe	oa	oo
On (ni)	on	oni	one	ona	ono
E (ci)	e	ei	ee	ea	eo
En (vi)	en	eni	ene	ena	eno
I (li, ŝi, ĝi)	i	ii	ie	ia	io
In (ili)	in	ini	ine	ina	ino

Laŭ formado de tiuj ĉi pronomoj estos deklinaciataj ĉiuj nomoj egalmaniere. Ekzemple, se E1 signifus Dio, estus deklinacio jena (singularo kaj pluralo) :

el	eli	ele	ela	elo
elon	eloni	elone	elona	elono

Se estus kreita vorto *ela*, diino, ĝi estus deklinaciata sekve :

ela	elai	elae	elaa	elao
elan	elani	elane	elana	elano

Ni memoras, kiamaniere estis skizita konjugacio de la verbo "esti" (*egēs* k.t.p.) Comenius en *Provo pri la nova harmonia lingvo* efektivigas tiun ĉi konjugacion sen helpo de la latina. Ni metu, ke *ban* signifas *esti*, ke prefikson **F** ni prenas por futuro, prefikson **P** por preterito ; **a**=mi, **e**=ci, **i**=li ; pluralo estas esprimata per longigo ; **á**=ni k.t.p. ; poste oni kunjugacios :

Prezenco :

bana	bane	bani ;	baná	bané	banĭ
-------------	-------------	---------------	-------------	-------------	-------------

Preterito :

pabana	pabane	pabani ;	pabaná	pabané	pabanĭ
---------------	---------------	-----------------	---------------	---------------	---------------

Futuro :

fabana	fabane	fabani ;	fabaná	fabané	fabanĭ
---------------	---------------	-----------------	---------------	---------------	---------------

Sumigante Comenius skribas en la fino : Nova lingvo devas esti tiom racia, harmonia kaj esence ĉionscienca, ke iu ĉionsciulo sukcesus ĝin renovigi, se ĝi estus perdiĝinta.

Ni ja ne havas la *pansofion* (ĉio-sciencan) kaj tial ni ne povas renovigi tiun ne finitan lingvon. Comenius ja mem en sia nefinita verko ne efektivigis konsekvence la samajn principojn en la *Panglotio* kaj en la *Provo*, sed li prezentas al la leganto por primedito siajn (iam laŭokazajn) pensojn. La leganto ekzemple rimarkis, ke eĉ en niaj nemultaj specimenoj estas du principoj por pluralo ; iam sufikso **-n**, iam longigo de vokalo.

Hodiaŭ jam al neniuj venos ideo, konstrui artefaritan lingvon laŭ skizoj de Comenius. Sed la sorto, kiu tiomfoje trafis lin maljuste, maljustis al li ankaŭ pro tio, ke lia *Panglotio* restis dum jarcentoj perdita. Aliokaze Comenius havus fiksan nomon en historio de artefaritaj lingvoj, kie li estas preskaŭ nekonata !

Josef Hendrich.
Tradukis S.K.

AGRABLAJ HOMOJ

Ekzistas homoj, kiujn la providenco dotis per speciala povo. Ili ne estas registreblaj en unu el la kutimaj rubrikoj. Ili ne estas spertaj, saĝaj, interesaj, sukcesaj, geniaj aŭ alimaniere etikedeblaj; ankaŭ ne oficiale rekonitaj kiel originaluloj. Ili povas esti iom de ĉio, aŭ de nenio. Ili tutsimple estas: agrablaj homoj.

Sed evidente ne estas tiom simple esti agrabla homo—ĉar ekzistas tiom malmultaj da ili. Kontraŭe, oni konas multe pli da tiaj, kiuj ne estas agrablaj.

Agrablaj homoj portas kun si klimaton, kiu adaptiĝas al ĉia klimato. Ili portas varmon en malvarman rondon, refreŝigon en varmegan atmosferon. Oni povas ilin senzorge miksi inter aliajn homojn, ili eniĝas ĉien bonege. Ili estas necesgaj en amika kunularo, kie ili formas la eksterteritorian ligilon inter eminentaj, sekve komplikaj gastoj—la sensignifaj, eventuale ĝenaj, la Nur-aféristoj, Nur-artistoj, Nur-scienculoj . . . Ili efikas ĝojige se oni renkontas ilin en la strato, en koncertejo, aŭ en stacidoma vestiblo. Trankviliganto en la peza aero de familia disputo. Ilian influon oni sentas eĉ tra la telefono.

La agrablaj homoj estas ŝatataj de ĉiu, sed neniu konsideras ilin kiel seriozajn. La fakto, ke ili estas agrablaj homoj permesas konkludi je iuj mankoj: manko de inteligento, de firmaj principoj, de profesia kapablo, de granda ambicio, aŭ je manko de propraj gravaj zorgoj; ĉar kun tiaj kvalitoj ili ja certe ne povus esti tiom agrablaj . . .

Agrablaj homoj, viroj aŭ virinoj, efikas iel neŭtrale. Eĉ se ili tre bone prezentiĝas, ili rivalas kun neniu je beleco aŭ eleganto. Malgraŭ ke ili eble estas belaj, ili lasas brili ĉiujn. Ili aŭskultas atenteme, ili ne rakontas pri malsanoj, nek pri akcidentoj; ili scias ĉiam diri ion beletan, aŭ scias sorĉi ion neatendite bonan el tio, kion aliaj plendas al ili. El la sama gazeto, plena je pesimismaj informoj ili legis ion ĝojigan aŭ bonhumoran—eĉ se tio aperis nur en la parto pri anoncoj. Ili sukcesas sugestii al aliaj, konsideri sin pli saĝaj, pli belaj, pli bonaj, pli riĉaj—kaj tio produktas brilan influon je la sentimento. Agrablaj homoj promenas kun sorĉa vergo, kiu malkovras al aliaj kaŝitajn fontojn.

Oni bezonas tiajn homojn kiel oni bezonas freŝan aeron aŭ kiel la ĉiutagan panon. En ĉi tiaj disŝiritaj tempoj la ŝtato devus ilin vivteni, aŭ minimume ili devus esti liberigataj je ĉiu imposto, ĉar ĉie kie ili aperas, ili kreas ion kio estas tiom grava kiom penicilino: nome harmonion.

Tre malofte okazas, ke oni analizas la ingrediencojn de la agrabla homo. Ili ja ne apartenas al la granda kategorio de la *sed*-homoj.

“Jes, li ofte estas netolerebla—sed ekstreme kapabla en sia profesio . . .”

“Ŝi estas malbelega—sed vera muzikgeniulo . . .”

“Li havas malbonajn manierojn—sed laŭdire li estas unuaranga matematikisto . . .”

“Ŝi enuigas—sed ŝi faras tiom da bono . . .”

Agrablaj homoj ne kaŭzas disputon kaj ne necesas cerbumi pri ili. Neniam ili ofendiĝas kaj ili ne koleriĝas. Ankaŭ ne necesas ilin konsoli, ĉar ili neniam plendas. Kaj se okaze oni helpas ilin el embaraso per monprunto—agrablaj homoj neniam estas riĉaj—la pruntanto ĉiam sentas sin bone.

Se oni penus ekzameni la elementojn el kiuj formiĝas la agrabla homo, oni farus interesajn malkovrojn. Oni trovas unue la takton de la koro, kun ĉiuj siaj nuancoj, devenantan el la efektive sankta simpleco, aŭ de la lasta granda ekkono.

Agrablaj homoj plej ofte estas izoluloj. Kelkfoje oni renkontas ilin kiel grandan maloftaĵon: kiel edzparon. Sed tio jam estas, por tiel diri, ekspozicia objekto; ĉar por normala geedza paro necesas, ke unu estu homo komplika.

Se agrabla homo mortis, multaj diras kun bedaŭro “Ho—!” Kelkfoje je ĝenerala miro oni sciigas, ke la agrabla homo havis malfacilan vivon aŭ profundan ĉagrenon, aŭ eble libervole forlasis ĉi tiun vivon. “Kio do? Kiu estus pensinta tion? Li ja estis tiel agrabla homo . . . !”

Anita: trad. François Hayotte.

ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

La 32-a Universala Kongreso unuanime aprobis la planon de D-ro Székely, ke anstataŭ sporadaj propagandadoj komenciĝu laŭplana tutmonda propagando. Tial U.E.A. faras konstantan rubrikon en sia gazeto kaj petas ĉiujn samideanojn atenti la donatajn konsilojn.

(5) Fakdelegitoj por propagando (mallonge: FDP) kolektu la ĉi tie aperantajn konsilojn, ĉar mankas loko por ĉiama ripetado.

(6) *Praktike uzebila* estos E. vere nur tiam, kiam ĉiu fako en ĉiu grava loko estos reprezentata per FD. En granda urbo ne sufiĉas FD pri “komerco.” FDP-oj klopodu, ke ĉiu grava branĉo de komerco kaj industrio havu apartan FD-on (ŝuoj, papero, oleo k.t.p.) Ne forgesu pri preso, radio kaj sciencoj. Nur preskaŭ *kompleta fakdelegita retaro* konkeros al ni la praktikajn homojn. Ĉiu FD vigle interrilatu kun sia tutmonda kolegaro. La faka laboro estas la vojo de la sukceso.

(7) FDP-oj bezonas kunhelpantojn, do ili eduku novajn propagandistojn. Zorgu, ke ĉie, kie oni povas paroli pri E., ĉestu iu, kiu parolas pri kaj por E. (kunvenoj, diskutoj, konferencoj, demonstracioj ĉiuspecaj k.t.p.) Grava tasko de la FDP estas: registri la eblecojn kaj atentigi la konvenajn, taŭgajn samideanojn.

(8) En ĉiu E.-kurso dum la lasta instruhoro la kursestro aŭ la FDP mem instruu la lernantojn pri propagando.

(9) Ne okazu ia kunveno de E. societo sen priparolo de la aktualaj lokaj propagando-problemoj.

Konatigu la ĉi tie aperantajn konsilojn per afiŝetoj en ĉiu E. ejo al la membroj kaj priparolu ilin detale por ke nia laboro efiku per la forto de niaj amasoj! Represigu la konsilojn en ĉiuj E. gazetoj.

ADOPTADO

de samideanoj en landoj kiuj ne povas pagi al ni

Kiel vi legis en *Esperanto*, UEA estas devigata ne akcepti membrojn en Germanujo, Hispanujo, Italujo, kaj Jugoslavujo, ĉar el tiuj landoj ni tute ne povas ricevi pagojn.

Kiamaniere oni povas ebligi al samideanoj en la cititaj landoj tamen esti membro-abonantoj de UEA en 1948?

Tiun ĉi eblecon donas la adoptado. Vi havas amikon aŭ korespondanton en unu el ĉi tiuj landoj. Vi scias ke li treege deziras konservi sian membrecon al la Asocio. Vi intencas eble plezurigi lin per donaco. Nu, vi povas fari tion adoptante lin.

Vi pagas la kotizon de Membro-Abonanto al la Administra Centro en Rickmansworth, aŭ al via Ĉefdelegito, laŭ la tarifo 1948 kaj vi indikas: Adopt-kotizo favore al XYZ. Tio sufiĉas; la administra centro faros la necesajon.

Ekzistas samideanoj kiuj volas helpi sed ne scias al kiu. Ili povas fari same, lasante la elekton al la Administra Centro. Tiu ĉi procedas konforme al la volo de la Komitato esprimita en Bern dum la kongreso.

Universala Esperanto-Asocio.

Ĉina Ironio

La gazeto *Sin Van Pao* ironie karakterizas la grandajn kvin: La Francoj agas tuj post kiam ili parolis. La Britoj agas parolante. La Usonanoj parolas nur post kiam ili agis. La Rusoj agas, sed ne parolas. La Ĉinoj paroladas kaj paroladas, sed ne agas.

Komentario

La homoj timas aĉeti tion, kio estas malmultekosta. Ŝajnas al ni, ke nenio en la mondo estas bona kaj malmultekosta, kaj tial ekzistas ĝenerala suspekto pri tio, kies prezo ridigas pro malalteco.

Rilate al Esperanto la afero estas tute simila. Ĝi ja estas la malmultekosta lingvo! Dum jaroj en ĉiuj landoj oni sonigis la tintilon pri la malmultekosteco de Esperantaj kursoj, kaj povas esti, ke ĝuste en tio kuŝas parto de la kaŭzo de la senkreditigo de Esperanto. "Senpagaj kursoj de Esperanto!" oni disbruas; kaj oni miras, ke troviĝas tiom malmulte da Esperantistoj.

Kiam oni malfermas senpagan kurson, la lernantoj alfluas amase, ne restas sidlokoj. Sed en la daŭro de la kurso, oni konstatas, lecionon post leciono, ke la entuziasmaj lernantoj forfalas pro tio, ke ili ne povas lerni Esperanton *sen laboro*. Oni reklamas la malmultekostecon, la facilecon, sed la realo elrevigas ilin. Por personoj, kiuj iras en la kurson anstataŭ al la kinejo, la studado estas peza afero. Esperanton oni povas lerni sen mono, sed ne sen laboro.

Tiu erara sinteno de niaj propagandistoj kaj kursaranĝantoj verŝajne baldaŭ malaperos, ĉar lastatempe oni povas rimarki en iuj Esperantogazetoj la tendencon postuli matrikulpagon en Esperantaj kursoj. El la milito venis kelkaj utilaj lecionoj kaj unu el la plej gravaj estas tiu pri la mona valoro de Esperanto. Nia lingvo ja fariĝis grava faktoro en la vivo, do oni pagu matrikulon, salajron, honorarion aŭ ion alian por lerni ĝin. Se la instruisto ne deziras pagon, nu la mono iru en la kason de la grupo aŭ asocio por la profito de la propagando.

Ni malfermu niajn okulojn kaj kontrolu nian aferon laŭ praktika, objektiva vidpunkto. Nia lingvo jam ne estas ludilo por senokupaj gesinjoroj, sed grava afero por la progreso de la homaro. Ni ne senhonorigu ĝin per sentimentalaj vekrioj, sed postulu por ĝi indan lokon inter la vivantaj lingvoj de la nuntempo. Ni loku Esperanton inter la salajratajn lingvojn de la mondo kaj samtempe ni kreu sufiĉe kompetentajn profesorojn por la gvidado de niaj kursoj. La nunan mankon de kompetentaj kursgvidantoj en la tuta mondo ni grandparte ŝuldas al tio, ke nenia profito venas al la gvidanto. Se gvidado de Esperanto-kurso donus materialan profiton al la instruisto, estas certe, ke multaj homoj sin dediĉus al akiro de kompetento. Ni pruvu ke idealo kaj praktiko povas kunesti en niaj rondoj.

Kaj antaŭ ĉio ni malebligu la allogan anoncon "Senpaga kurso."

Reverkita laŭ artikolo en *Natura* (Portugalujo).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 201

3an de Decembro 1947

NOVAJ DELEGITOJ

Argentino

Villa Maria. D : P. Vianni, 9 de Julio 268.

Belgujo

Schoonaarde. FD (Fervojoj) : A. Norro, Station Schoonaarde. Tel : 3124.

Britujo

Leeds. FD (Instruado) : F-ino D. F. Wilkinson, Hillside, Huby, Nr. Leeds. Tel : 316 Huby.

Llandudno. D : S-ino M. Jones, Skerryvore, Bryn-Pydw, Llandudno Junction.

Rugby. D : H. Mitchell, 324 Lawford Road.

Danujo

Esbjerg. FD (Juro) : J. Andreasen, Kongensgade 70. Tel : 1776.

Kolding. VD : M. Riechert, Fjordvej 67, "Söglint" Strandhus.

FD (Junularo) : N. Balle, Kløvervej 1.

København. FD (Studentaj aferoj) : J. Vesterland-Andersen, Bernstorffsvej 78, St. th. Hellerup, København. Tel : Hellerup 5295.

Odense. D : O. C. Lange, Oppermannsvej 17. Tel : 11.606.

Store-Heddinge. FD (Instruado) : Hans Dalgaard, Ved Munkevaenget.

Germanujo

Adenstedt. D : Richard Bohnert, (20a) Adenstedt über Alfeld (Leine).

FD (Ŝakludo) : La D.

Dillingen a/Donau. D : J. Kunert, Peterswörth 64.

Immenstadt-Allg. FD (Alpinismo) : La D.

Kattenvenne. D : J. Simon, (21a) Kattenvenne 33/Westf.

Italujo

Casale Monferrato. D : C. Ubertis, Via Trevigi 8 (Biblioteca Civica).

Torino. FD (Asekuro) : D-ro M. Bonino, Via Saccarelli 31. Tel : 74.961.

Polujo

Lódz. D : St. Malek, ul. Stalina 31 m. 38.

Wrzesnia. D : W. Monarszynski, ul. Kosynierów 54.

Svedujo

Kisa. D : H. Karlsson, Box 68 (Posthuset). Tel : 269.

Sandared. D : H. K. Nilsson, Box 700.

Taubacken. D : Gustav Ottander, Taubacken, Östervalä. Tel : Östervalä 7.

Svislando

Pratteln. D : J. Vogel, Schlosstr. 4.

St. Gallen. FD (Instruado) : J. Hohl, Hubertasstr. 2.

ŜANĜOJ

Argentino

Bell-Ville. D : vakas.

Belgujo

Bruxelles. FD (Komerco) : vakas.

Britujo

Corsham. D : vakas.

Watford. D kaj FD (Komerco) : nova adreso : 24 Purbrock Avenue.

Danujo

Vejle. FD (Turismo) : vakas.

Nederlando

Hoogezand. D : nova adreso : Verl. Hoofdstraat 79.

Svislando

Genève. D kaj FD : nova adreso : Baha'i European Office, 37 Quai Wilson.

Le Locle. D : vakas.

Rheineck. D kaj FD : nova adreso : Grunaustrasse.

Waldhaus-Flims. FD : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947

298. S-ro M. J. Gaio, Rio de Janeiro, Brazilo.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 30a de Novembro 1947, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Novembro 1946 :

	1946	1947
Asociaj membroj ..	7660	8279
Individuaj membroj :		
MJ	1128	1134
MA	4272	5302
MS	255	295
Patronoj ..	24	22
DM	103	151
HM	21	53
	5803	6957
	13463	15236

NOVA DUMVIVA MEMBRO

S-ino H. Fischer, Bern, Svislando.

PATRONOJ 1948

- S-ro J. R. Grocott, Blackburn, Anglujo.
- S-ro R. F. Jervis, Slough, Anglujo.
- S-ino J. M. Ravestein, Den Haag, Nederlando.
- S-ro J. L. Ford, London, Anglujo.
- S-ro W. A. Gibson, Bathgate, Skotlando.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

- S-ro H. W. Allen-Smith, Watford, Anglujo.
- S-ro H. Buchli, Bern, Svislando.
- S-ro K. Jost, Zürich, Svislando.
- F-ino H. Monod, Morges, Svislando.
- S-ro P. Le Brun, Kreuzlingen, Svislando.
- S-ro T. L. C. Bluett, London, Anglujo.
- S-ro R. Dunbar, London, Anglujo.
- S-ro A. Fisher, Parkstone, Anglujo.
- S-ro C. C. Goldsmith, Rickmansworth, Anglujo.
- S-ro W. Chitty, Dover, Anglujo.
- S-ro F. L. Gadsby, Birmingham, Anglujo.
- F-ino C. M. Glennie, Birmingham, Anglujo.
- S-ro E. J. Hales, Sheffield, Anglujo.
- F-ino H. H. Ison, Braintree, Anglujo.
- F-ino M. Jay, Bishop Auckland, Anglujo.
- S-ro F. C. Rudman, London, Anglujo.
- S-ro T. Goldman, Rotterdam, Nederlando.
- S-ro G. D. Edwards, London, Anglujo.
- S-ro H. G. Endean, Epsom, Anglujo.
- S-ro F. W. Shaw, Whitworth, Anglujo.
- S-ro R. E. S. Wright, Sutton, Anglujo.
- S-ro C. Hougaard, Aabyhøj, Danujo.
- F-ino K. Walden, Ystad, Svedujo.
- S-ro A. Prince, Letchworth, Anglujo.
- F-ino B. Bowell, Birmingham, Anglujo.
- S-ro E. C. Hilder, Bideford, Anglujo.
- S-ro D. J. Langman, Birmingham, Anglujo.

35. S-ro J. Lovell, Ruislip, Anglujo.
 36. S-ro J. D. O'Dell, Lincoln, Anglujo.
 37. S-ro K. J. Young, North Cheam, Anglujo.
 38. S-ro H. Wankmüller, Immenstadt, Germanujo.
 39. S-ro J. Soyeur, Liège, Belgujo.

DONACO por helpi al la elspezoj de la Petskribo : J. v. d. Snoek 4ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Serva Centro

PALAIS WILSON, GENÈVE, SVISLANDO

De tempo al tempo ni publikigos mallongajn informojn de la Serva Centro en Genève.

Adreso : Ĉion, kio rilatas la redakcion de *Esperanto*, kaj la diversajn servojn, oni sendu al UEA, Palais Wilson, Genève. Oni sendu nenion pri administrado, anoncoj, financoj, k.t.p. al ĉi tiu adreso, sed senescepte al la Administra Centro en Rickmansworth.

Bibliografia Servo. Ni informas, ke pro teknikaj kaŭzoj libroj ne povas esti pruntedonataj el la Biblioteko de UEA. Ni klopodas ke la malhelpoj estos forigataj tre baldaŭ, tiel ke la Biblioteka Servo ree funkcii.

Ni serĉas libervolajn kunlaborantojn por la bibliografiaj laboroj. Personoj loĝantoj en Svislando kaj pretaj kunhelpi bonvolu skribi al ni.

Ekspozicia Servo. Regule alvenas al ni demandoj pri ekspozicia materialo. Kun bedaŭro ni informas ke ni ne disponas je nova materialo. La malnovan ni fordonis, ĉar plejgrandparte ne plu uzebila. Tuj kiam ekzistos sufiĉe da novaj objektoj por ekspozicioj ni preparos kolektojn.

Enciklopedio de Esperanto. La redakcio de EdE, kiu rekomencas sian agadon, serĉas la kunlaboron libervolan de spertaj Esperantistoj en Svislando kaj aliloke, ne tro malproksime de Genevo. Personoj pretaj partopreni tiun ĉi laboron bonvolu sin anonci ĉe la redakcio, Palais Wilson, Genève.

Kvankam la EdE ne estas oficiala afero de UEA, tiu ĉi entrepreno estas efektivebla nur danke al ĝi, kaj speciale al la riĉa dokumenta materialo kiu troviĝas en la arkivejo kaj en la Biblioteko de UEA.

Redakcio de "Esperanto." Ni atentigas niajn bonvolajn kunlaborantojn ke tekstoj devas atingi nin plej malfrue la 28an de la monato por aperi en la postsekvanta numero de la gazeto. (Do, la 28an de Januaro por numero de Marto).

Por faciligi la laboron de la redaktoro, estas konsilinde sendi tekstojn maŝinskribitaj kun duobla interspaco inter la linioj. Ne uzu palan, sed bonan nigran rubandon. Ne skribu dorsflanke. Evitu troecon de adjektivoj; ne parolu pri espero sed pri faktoj. Versfarantoj memoru, ke por fariĝi poeto oni devas scii fari versojn.

Pro la nepra devigo uzi racie la spacon en la gazeto, volu skribi koncize; ju pli mallonga la teksto, des pli certe ĝi povos frue aperi.

Ŝlosiloj de Esperanto. Nova teksto pri la organizo Esperantista estas preparata. Interesatoj intencantaj eldoni aŭ reeldoni ŝlosilon volu sin turni al ni.

La ŝlosilaro de Esperanto nuntempe ricevebla konsistas el 20 lingvoj. Elĉerpigis Baska, Germana, Juda, Kroata, Latva, Litova, Pola, Serba, Rusa, Ukraina. Nove aperis la Finna.

Hans Jakob,

Genève, 1-an de Januaro 1947. *Honora Administranto.*

ESPERANTO EN RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri ĉi tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	16.30-16.45	Praha. 1935m. kaj 49.92m. I.	
	17.15-17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions esperantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.	
	22.00-22.15	Praha. 49.92m. P.	
Dimanĉo	15.00-15.15	Sveda Radio. 19.80m. kaj 27.83m. I. pri la 33a Universala Kongreso. (Nur la unuan Dimanĉon de la monato)	
	Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
		21.50-22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	22.00-22.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan Lundon de la monato).	
	23.30-23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.	
	Merkredo	17.20-17.30	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. Esperanto-Servo, Wien, Neutorgasse 9.
17.45-17.50		Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern.	
18.50-19.00		Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.	
Ĵaŭdo	21.45-22.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).	
	22.00-22.10	Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5.	
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).	
Vendredo	17.45-17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.	
	18.45-19.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.	
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).	
Vendredo	22.00-22.10	Ostrava. 259m.	
	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.	
	22.30-22.35	Budapest I (kiel je lundo).	

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo signifas ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

Ĉu vi iros al Malmö ? Se jes, vojaĝu iom pli frue por ĉeesti la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør (Elsinoro), Danlando, nur 3 horojn de Malmö. Kurstempo : 17-24 kaj 24-31 de julio. Tie vi ekhavos bonegan lingvan ekzercon antaŭ la kongreso. Prospekto havebla ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

40 kursanoj petegas skribu tuj al letervespero, 4an de Februaro. Patera, Britská 42, Cheb, Ĉeĥoslovakujo.

Letervespero ! En la fino de Aprilo ni aranĝos letervesperon. Ni atendas leterojn aŭ poŝtkartojn el la tuta mondo. Respondo garantiata. Silkeborg Esperanto-Klubo, S-ro O. J. Olesen, Vestergade 27, Silkeborg, Danlando.

Mi interkorespondas nur per tre bele filatele afrankitaj pk. aŭ leteraj kovertoj kun belbildaj pm. S-ro Romain Chambez, 44 Rue du Haut-Pavé, Etampes (S. et O.), Francujo.

Alfred Mittey, 45 rue Ordener, Paris 18, Francujo deziras interkonatiĝi kun Esperantista framasono loĝanta en Malmö, Svedujo.

Dresden-Gittersee (Germanujo). F-ino Sigrid Wolf, komercista lernantino, Birkigter Hang 43, deziras korespondi L., PK. PM.

Mi deziras korespondi tutmonde. Certe respondos. Skribu al R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, Sheringham, Norfolk, Anglujo.

Mezaĝa lignafisto deziras korespondi kun Londonano en Esperanta aŭ Angla lingvo. Temo : la situacio de la mondo kaj arto. S-ro B. Malmberg, Byggmästareg. 6, Kristinehamn, Svedujo.

Gelernantoj ĉe telefon-fabriko deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu unue al H. J. Harris, La Haveno, 36 Dene Road, London, N.11, Anglujo.

Neniu Lingvo Povas Vivi Sen Literaturo !



Tial akceptis ĉiu vera esperantisto kun ĝojo la reaparon de

LITERATURA MONDO

la beletra revuo en Esperanto.

Formato 29×20 cm. Aperas provizore en ĉiu dua monato sur 32 paĝoj.

Jarabono 3.00 USA-dolaroj (15ŝ.) aŭ egalvaloro en via mono.

Postulu senpagan prospekton kaj sendu vian abonon al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA INTERNACIA POŝTMARK-KATALOGO de I.A.P.K.

Vol. I. Grandbritujo : prezo 4 ŝil. (12 I.M.S.), afr. 3p.; aŭ 17 rpk.

Mendu ĉe via ĉefdelegito aŭ Peranto de U.E.A. aŭ rekte ĉe U.E.A., aŭ ĉe la eldonisto (kun escepto de tiuj landoj el kiuj pagoj al Britujo ne estas ebla).

Kvankam ĉi tiu katalogo estas precipe utila por la kolektanto, ĉiu entuziasma Esperantisto devus posedi ĝin. Ĝi estas la unua tiuspeca verko, kaj estas grava kaj konvinka propagandilo.

La Katalogo estas bele presita sur arta papero kun ilustraĵoj de ĉiu poŝtmark-desegno. Ĝi estas kompleta registrilo de ĉiuj poŝtmarkoj de Britujo kaj enhavas sekcion por specialistoj. Ĝi estas la fidinda konsultilo pri britaj poŝtmarkoj.

La Internacia Poŝtmark-Katalogo estas eldonita por la

INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK-KOLEKTANTOJ

al kiu ĉiu vigla Esperantisto kaj Filatelisto devus aliĝi. Detalojn kaj informojn kontraŭ freŝa poŝtmarko de sia lando oni povas ricevi de :

I.A.P.K., XPDO House, DIDCOT, Berks., Anglujo.

LA "EPOKO" LIBROJ

Serio de interesaj romanoj por la distriĝa horo

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie.
El la angla tradukis "Etulo".
183 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** Francisko Molnár.
El la hungara tradukis L. Spierer.
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse.
El la angla tradukis G. Badash.
185 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells.
El la angla tradukis E. W. Amos.
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs.
El la angla tradukis K. R. C. Sturmer.
181 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
6. **Colomba.** Prosper Mérimée.
El la franca tradukis Prof. J. Beau.
184 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi.
El la hungara tradukis L. Spierer.
148 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj afrankite.
8. **La Virineto en Bluo kaj aliaj rakontoj.**
Originale verkitaj de Mason Stuttard.
150 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj afrankite.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo